

Numero: 225.
Februaro 2011.

19-a jarkolekto

LITERATURA FOLIO

VESPERTO



Redaktanto:
Apáti Kovács Béla
Kaposvár
Béla király u. 44.
H-7400 HUNGARIO
Telefona: 82/ 410-664
Retadreso: espbela@t-online.hu
Eldonanto: Kaposvara Esperanto Centro
Lingve kontrolis: Tuboly Erzsébet

Karnevalo

Gaja estas tiu ĉi monato. Multloke en la mondo estas karnevaloj. Gajaj homoj paradmarŝadas surstrate vestinte maskojn aŭ en Brazilo belegaj junulinoj dancas tage kaj nokte.

La 5-an de februaro en nia urbo Kaposvár estis karnevalo. Vere ĝi ne estas mondfama, kiel en Venecio aŭ tiu de Rio, sed en la sekva jaro estas inde viziti nian urbon por rigardi ĝin.

Tiu ĉi tritaga bonhumora popolifesto estas aranĝita en ĉiu jaro, kaj ĝi allogas multe da turistoj el la tuta lando.

La ĉefprogramo, la paradmarŝado okazas sabate posttagmeze en la urbocentro, kiam la partoprenantoj dancante, kantante marŝas tra la tuta urbo.



Mia plano estas esperantigi nian karnevalon, kaj por ĉi tiuj tagoj mi invitos geesperantistojn. Ni karnevalumu, kaj dume ni ekzercu Esperanton montrante al la kapoŝvaranoj, la zamenhofa lingvo vivas.

Estus bone, se multaj geesperantistoj aliĝus al la venontjara Esperanto Karnevalo.

Se mia plano realiĝos, tiam en la sekvaj numeroj de Vesperto Vi estos informitaj pli detale.

Mi jam nun garantias al vi, la prezoj estos moderaj kaj ili plaĉos ankaŭ al vi.

Do jam nun komencu pensi, kion vi faros en 2012 komence de februaro.



-Redaktanto-

Lingvoj

Kial estas tiom multe da lingvoj?

Ĉu vi scias la respondon? – Ne. Ĉar ankaŭ mi ne scias. Neniu scias. Sur la ter globo tion neniu scias, kvankam multaj lingvistoj, sciencistoj esploris, eĉ esploras la ekziston de la lingvoj.

Kio estis tiu forto, kio distrancis la homan penson kaj naskigis novajn lingvojn.

Mi ne komprenas, kial estas tiom multe da lingvoj. Estus bone, se nur unusola lingvo ekzistus kaj ĉiu povus komuniki unu kun la alia.

Kia estus seninterpretista mondo? Kie ajn oni estus



en la mondo kaj sen ĝene oni povus kompreni sin.

Bedaŭrinde ĝi estas nur sonĝo, kaj neniu kredas, ke tia mondo iam ekzistos, kaj malaperos la lingva Babelo.

Fakte naciaj lingvoj ĉiam restos, eĉ la mondo kaj ni homoj fariĝus pli malriĉaj, se iutage malaperus la naciaj lingvoj.

Tamen oni devas trovi solvon por tiu ĉi tasko kaj oni devas superi la grandan lingvan ĥaoson, ĉar la homaro droniĝos en la oceanon de l' lingvoj.

Ekzistas lingvo, kiu povus helpi al la homaro kaj per ĝi falus la lingvaj bariloj. El la mondo malaperus la lingvaj miskomprenoj.

Tamen estas granda sekreto, kial oni atakas tiom multe Esperanton.

Kiel konvinki niajn homfratojn, ke ĉi tiu lingvo servas nin kaj se ĝi disvastiĝus tutmonde, tiam ankaŭ nia mondo estus pli bone.

Ni, geesperantistoj bone scias la valoron de Esperanto kaj ĉiutage ni sentas, spertas ĝiajn utilojn. Por ni la zamenhofa lingvo estas tre grava. Multaj geesperantistoj opinias, ĝi estas ilia dua gepatra lingvo.

Ni kredas kaj esperas, iam alvenos tiu tago, kiam ĉiu parolas ĉi lingvon. Kiu scias ĝin, tiu ne estos strangulo. Aliaj homoj ne montras al ili mokante, eĉ ĉiu benos la kreinton de la internacia lingvo, ke li donis al la homaro ilon, kiu helpas kompreni nin unu kun la alia.



-Ŝaŝa-

La sekreto de kapelo

II.

Ili longe vagadis de monto al monto, sed ili renkontiĝis kun neniŭ. Kvazaŭ ĉi tiu stranga mondo estus senhoma.



-Mi jam estas lacega – diris la pli malalta viro – ni ripozu, eĉ mi estas malsata. Ni ne kunportis manĝaĵon, ĉar vi diris, ni hejmeniĝos post kelkaj horoj. Kiu scias kiom longe ni jam estas for.

Lia kunulo ne sciis la respondon. Ankaŭ li estis nervoza, kaj ŝajne lin ege ĝenis tiu ĉi neatendita situacio.

Jam ili trairis multe da montoj kaj valoj, sed ankoraŭ ili renkontiĝis kun neniŭ.

Ĉu tiu ĉi stranga mondo estus senhoma?

Kie ili estas? Kia sorĉo kaptis ilin? Ĉu ekzistas liberiĝo el tio?

Starante sur alta montopinto ili estis senkonsilaj. Ili tute konfuziĝis. Ili jam volonte reirintus al sia mondo, sed ili misvojis.

Ili senesperigante sidiĝis sur ŝtonon kaj ili rigardis la pejzaĝon.

Kien iri?

Subite en la malproksimo ili ekvidis arĝente brilantan linion, kvazaŭ ĝi estintus rivero.

Ili mute ekstaris kaj komencis iri al ĝia direkto tion esperante, ke tie ili renkontos iun.

Denove ili iris longe. Dumvoje ili ne parolis unu al la alia, ĉar jam ili estis tre lacaj kaj ili ŝparis la forton. Krome ankaŭ la soifo ege torturis ilin. Jam delonge ili ne trinkis.

La vido de la rivero donis esperon al ili.

Ili ne trompiĝis, ĉar trans la rivero ili ekvidis domojn. Kelkaj kamparanaj konstruaĵoj staris transe, sed ili ne vidis ĉirkaŭ la domoj homojn kaj aliajn estaĵojn.

Tio tre timigis ilin, ĉar vere ili ne diris, sed suspektis, ili transiris fantoman mondon, de kie oni ne povos liberiĝi. Por ĉiam ili tie ĉi restos. Sed tion ili ne kuraĝis eldiri kaj mensogante unu al la alia, ke trans la rivero la problemoj solviĝos kaj trovos la hejmenkondukantan vojon.

Ili ambaŭ sentis, ke tio estas nur iluzio. De tie ĉi ili neniam povos hejmeniri.

Ili komencis serĉi ponton aŭ boaton por trairi sur la rivero. En kiun ajn direkton ili rigardis, ponto estis nenie, eĉ ankaŭ boato mankis.

Kiel trairi?

Fine ili decidis, ke ili ekprovos naĝi al la alia bordo. La rivero ne estos tro rapidmova kaj espereble ili povos naĝi en ĝi facile.

Unue ili hezitis, ĉu eniri aŭ ne, ĉar ili ne sciis, kio atendos ilin sub la akvo.

La rivero ne estis profunda, ĝisbruste ili marŝis en ĝi. La akvo velure karesadis ilian korpon.

Ili longe iris, sed ili ne povis atingi la bordon, ĉar post ĉiu paŝo ĝi malproksimiĝis de ili.

Ili ne komprenis ĉi tiun strangan fenomenon.

Jam pli ol duonhoron ili iris al la alia bordo. Time ili interrigardis kaj haltis meze de la rivero.

-Kio okazis? – ili demandis unu de la alia – Ni ne povas atingi la alian bordon. Terure!

Fine ili reiris malgaje al la bordo kaj lacege eksidis sur la sablon.



-Kion ni faru nun? – demandis la pli alta viro – En kia mondo ni estas? Aliborde estas kamparanaj domoj, tamen ni ne povas iri tien. Ĝi estas damnita regiono.

-Mi havas bonegan ideon – eksaltis lia kunulo – Ni kriegadu kaj eble la domanoj aŭdos nin.

Tio plaĉis ankaŭ al la alia kaj ili duope plengorĝe komencis kriegadi:

-Halo! Halo! Ĉu aliborde en la domo estas iu? Halo!

Ili longe kriegadis, sed ili ne ricevis respondon. Pasis kelke da minutoj kaj neatendite malfermiĝis la pordo de la transa domo kaj ekaperis strangaspekta maljunulo.

Li komencis mansigni al ili.

-Kion li signas? – demandis la malalta viro kaj atente li rigardis la mansignantan viron – Kvazaŭ li invitus nin al la alia bordo.

-Sinjoro! Ĉu vi komprenas nin? – ili kriis – Bonvolu helpi al ni! Kie ni estas?

La maljunulo atendis iom kaj laŭte kriis ion en nekonata lingvo:

-Take ku! Take ku!

-Ni ne kompras vin. En kiu lingvo vi parolas?

-Take ku! Take ku! – ripetiĝis la krio de la maljunulo kaj li plu mansignis.

-Li diras, ke ni iru tien. Sed kiel? Ni ne povas atingi la transan bordon. Ni estas en magia mondo.

Ankoraŭ kelkfoje ripetiĝis la invito kaj kiam la maljunulo vidis, ke ni ne ekiras al li, li turnis sin kaj malaperis en la domo.

Ili fariĝis malgajaj, ĉar la espero forflugis, ke iu helpos al ili.

Denove ili staris sola sur la bordo de la rivero kaj ne sciis kion fari? Ĉu ili restu aŭ ili iru plu laŭ la rivero por serĉi aliajn homojn ekscii, kie ili estas?

(daŭrigota)

-Apáti Kovács Béla-

Poezio

**L. L. Zamenhof****Al la «Esperantisto»**

En bona hor'! Ni aŭdis la signalon
 kaj bataleme saltas nia koro.
 Konduku nin, komencu la batalon
 sub bona stelo, en feliĉa horo!

Amikoj de proksime, malproksime,
 salutas vin, ho nia luma stelo!
 Konduku nin, senhalte kaj sentime,
 al nia granda, sankta, glora celo!

Ne tre facila estas nia vojo
 kaj ne malmulte ankaŭ ni suferos;
 sed batalante, kun plej granda ĝojo
 senhalte ni laboros kaj esperos.

For estas jam la baroj de l' komenco,
 l' unua muro estas trarompita,
 kaj dolĉa estos nia rekompenco,
 kiam la celo estos alvenita.

**El Heine**

En sonĝo principinon mi vidis
 kun vangoj malsekaj de ploro, –
 sub arbo, sub verda ni sidis,
 tenante nin koro ĉe koro.

"De l' patro de l' via la krono
 por mi ĝi ne estas havinda!
 For, for lia sceptro kaj trono –
 vin mem mi deziras, aminda!"

– "Ne eble!" ŝi al mi rediras:
 "En tombo mi estas tenata,
 mi nur en la nokto eliras
 al vi, mia sole amata!"

Tradukis L.L Zamenhof**Kanto pri feliĉo**

Kiam la koron forlasis esper'
 kaj atendeblis soleca vegeto,
 venis subite al ni primaver',
 benis nin sorto per sia rideto.

Kredis mi, ke pro anima malplen'
 ami denove ne havos mi forton,
 sed venis vi kaj degelis la splen',
 nun ni feliĉas – kaj dankas la sorton.

Ni eĉ rezistis, sed malgraŭ la vol'
 cedis, glitante laŭ sorta fadeno.
 Portis nin vento leĝera – Eol' –
 al la feliĉ', al mirakla haveno.

Verda stelet' iĝis nia lumtur'
 spite al nuboj sur la firmamento.
 Se en nebulo kaŝitas futur' –
 ĝoju pri ĉiu aparta momento!

Oni ne plendu pri misa fatal'.
 Viv' donas ŝancon – kaj tio sufiĉos,
 ke la deziroj estiĝu real'.
 Se vi persistos – do nepre feliĉos!

Valentin Melnikov

Por infanoj



AVENTUROJ EN ESPERANTUJO

Kvara ĉapitro

Kiam la geknaboj ĉion detale rakontis al la viro, dormeme atendis okazontaĵojn. La maljunulo ekridis, karesis ilian kapon, kaj li diris:

-Por ĉi nokto vi restos en mia domo, kaj matene mi telefonos al la lernejo. Mi scias, de kiu lernejo vi formigris. Infanaĝe ankaŭ mi faris similajn. Ho, kie estas tiuj belegaj someroj! Sed nun iru dormi, ĉar mi vidas, vi estas dormemaj.

Li montris al Peĉjo kaj Kristinjo la ĉambron, kie ili povos dormi. Ĝi estis bele meblita ĉambro kun multaj pentraĵoj.

-Mi mem pentris ilin – diris la maljunulo, kiam li rimarkis ilian miron.

-Ĉu oĉjo estas pentristo? – demandis scivoleme Kristinjo.

-Jes kara mia, sed jam dormu, ĉar baldaŭ estos mateno.

La du geknaboj rapide endormiĝis, kaj nur tiam vekiĝis, kiam la sunradioj enpenetris la ĉambron. Unue ili ne sciis, kie ili estas.

-Bonan matenon! – salutis ilin la bonkora maljunulo – Ĉu vi dormis agrable?

-Jes – ili diris.

-Mi telefonis al la lernejo kaj parolis kun via instruistino, kiun mi bone konas. Mi trankviligis ŝin, ke vi estas en bona loko. Ŝi diris, ke posttagmeze post la instruado ŝi venos ĉi tien, kaj ŝi transportos vin al via tranoktejo. Ne ĉagrenu, ĉio estos en ordo. Dume almenaŭ ni havos eblon babiladi kaj montri al vi mian ĝardenon.

Peĉjo kaj Kristinjo ĝojis, ke fine ĉio aranĝiĝis, ĉar ili timis pro la senpermesa foriro el la lernejo.

Post la bongusta matenmanĝo la maljunulo sidiĝis al ili kaj diris:

-Ankoraŭ vi ne scias mian nomon. Mi nomiĝas oĉjo Karlo. Mi alvenis Esperantujo antaŭ multaj jaroj, kiam ankaŭ mi estis junulo.



La geknaboj atente aŭskultis la maljunulon, kiu rakontis tre interesan historion de Esperantujo.

Antaŭ multaj jardekoj kelkaj junaj diversnaciaj geesperantistoj decidis fondi novan landon por esperantistoj.

Tiam ilia plano estis utopio en la okuloj de multaj homoj, eĉ ankaŭ kelkaj geesperantistoj ne kredis, ke ĝi povos realiĝi. Estis kiuj primokis ilin.

Tiuj kelkaj entuziasmaj geesperantistoj, inter ili estis ankaŭ la oĉjo Karlo, fore de la mondo en la malproksima oceano aĉetis verdan insulon kaj tie ili komencis novan vivon.

En la unuaj jaroj ilia vivo estis tre malfacila, ĉar ĉion ili mem devis fari sen helpo. Ili konstruis loĝdomojn kaj diversaj konstruaĵojn. Ili kulturis la proksimajn grundojn, kaj tie ili kultivis ĉiun necesajon por la vivteno. Krome ili havis ankaŭ dombestojn, gekokojn, bovinojn, kaprojn, porkojn, kiuj donis al ili lakton kaj viandaĵojn.

Jam en la unua jaro ŝajnis, se ili laboras diligente, tiam baldaŭ, post kelkaj jaroj Esperantujo prosperos. Ilia sukceso rapide disvastiĝis sur la tuta terglobo kaj vekis la intereson de la homoj. Ili amase deziris translokiĝi al la insulo.

Loĝi en Esperantujo estis nur unusola kondiĉo: la nova civitano devas scii la zamenhofan lingvon, kaj akcepti la pacan kunvivadon.



Peĉjo kaj Kristinjo silente aŭskultis lin. La oĉjo Karlo daŭrigis la historion.

-Apenaŭ pasis dek jaroj la loĝantaro de Esperantujo superis milon. Anstataŭ la unuaj kabanoj faritaj el ligno konstruiĝis belaj ŝtondomoj, kaj naskiĝis la ĉefurbo Zamenhofio, kie nun ankaŭ vi estas.

Ho, kiel belegaj kaj neforgeseblaj estis tiuj jaroj! Vere tiam ankaŭ mi kaj miaj geamikoj estis pli junaj. Ni kune faris ĉion. Neniam estis kvereloj. Eble tion en la fora mondo de kie vi alvenis, oni ne kredus. Certe oni dirus, tia ideala lando ne ekzistas. Sed tamen ni kreis ĝin. Ja, ankaŭ vi povas konvinkiĝi pri tio. Ĉi tie ĉiu homo estas feliĉa, kaj parolas saman lingvon. Ni ne bezonas interpretiston, kvankam niaj civitanoj venis el diversaj landoj, kie oni parolas malsamajn lingvojn kaj pro tio ofte ili miskomprenas unu la alian. Ni montris al la mondo, oni povas vivi pace kaj harmonie unu kun la alia, se oni deziras.

Laŭdirinde, ke ankaŭ vi ellernis Esperanton, ĉar ĝi estas grandioza lingvo. Dank al d-ro Zamenhof. Kompreneble nun ankoraŭ vi povos reiri al via lando kaj mondo de kie vi venis. Tamen mi tre esperas, iutage vi decidus tiel, ke vi translokiĝos ĉi tien kaj fariĝos la civitanoj de Esperantujo.

(-daŭrigota)

Gajaj bildoj

Gajaj bildoj



-For de mi, vi ne estas esperantisto!



-Kiel vi opinias pri Esperanto?



-Nun ni komencu lerni iom da Esperanto gramatiko!



-For de la Paradizo, se vi ne deziras lerni Esperanton!